Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

Septembro 1990

BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS
LI SVI

SVISA ESPERANTO-SOCIETO
INFORMAS

## SVISA PARTOPRENO EN LA 75-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO HAVANO, 14-21 JULIO 1990

**Raportas Andy KÜNZLI**

### Longa vojo

Mi mem vojaĝis al tiu tropika lando, raportas Andy KÜNZLI, ne nur por sperti tiun unikan eventon, sed ankaŭ por ĉeesti la 46-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO, kiu okazis post la UK en la ferieja loko Playa Giron, sude de la insulo. (Redaktista noto: Dietrich WEIDMANN (Zürich) ankaŭ ĉeestis la junularan kongreson, en kiu Andy KÜNZLI kandidatiĝis al la vicprezidanteco de TEJO. Gratulojn! Decido sekvos baldaŭ).

Por multaj esperantistoj, kiuj loĝas en Eŭropo, ne estas memkompreneble partopreni tian kongreson, ĉar la partopreno en ĝi estas ligita kun financaj malhelpoj, kiujn kaŭzas precipe longa flugo al Havano. Sed tiun ĉi problemon spertas ne nur eŭropanoj, kiuj, vidataj per la okuloj ekzemple de afrikano aŭ aziano estas nepre riĉuloj; la saman malfacilaĵon spertis esperantistoj eĉ el la pli malpli proksima amerika regiono mem. Certe almenaŭ mi atendis multe pli da gesamideanoj el diversaj sudamerikaj landoj. Sed bedaŭrinde ankaŭ por ili la vojo ĝis Kubo estas longa.

### Pri la aranĝoj

Tamen, al la 75-a Universala Kongreso aliĝis entute 1617 kongresanoj el 54 landoj. Tiujn ĉi ciferojn mi ŝtelis el la statistika libro de Osmo BULLER, la ĝenerala sekretario de UEA. Ni volas kredi, ke grandparto de tiuj aliĝintoj fakte partoprenis la kongreson.

La kongresa ĉeftemo **Esperanto-evoluo kaj kultura diverseco** ebligis plej diversajn kunsidojn inter fakuloj kaj nefakuloj. Sub la gvido de Jane EDWARD (Usono), doktorino pri folkloro, magistrino pri la angla literaturo en la usona universitato de Hartford, okazis kvar ampleksaj kunsidoj pri tiu temo. Ĉefkontribuis estraranoj de UEA Roman DOBRZYŃSKI (Pollando), Ulrich LINS (Germanio) kaj SO Gilsu (Koreio), kiel ankaŭ Humphrey TONKIN (Usono) kaj universitataj reprezentantoj el Kubo mem.

Dum la semajno estis planita kaj realigita ankaŭ **la Tago de la Paco,** en kiu okdeko da partoprenantoj diskutis pri la temo plu-vivado en la 21-a jarcento, konsiderante precipe ekologiajn problemojn, edukadon kaj internacian kunlaboron.

Internacia Kongresa Universitato okazigis sian 43-an sesion sub la rektoreco de profesoro Helmar FRANK (Germanio). Ĉiuj anoncitaj prelegoj okazis. Ili estis ne nur resume eldonitaj en dulingva broŝuro fare de la kubanoj, sed ankaŭ ripetitaj en sciencaj institutoj en Havano kun samtempa traduko en la hispanan lingvon.

Centon da homoj ĉeestis la 12-an sesion de la esperantologia konferenco, kiun gvidis profesoro Humphrey TONKIN. Ĝia unua parto traktis la temon **terminologio kaj lingva evoluo en esperanto,** la dua **esperanto kaj kultura identeco.**

Grandan atenton dediĉiĝis al la problemo edukado. En la **Tago de Lernejo** okazis prelegoj kaj diskutforumo. Lige kun tiu tago estis iniciatita internacia vidbenda kurso, kiun povos uzi diversaj televidstacioj tra la mondo. Tiu ĉi afero estis lanĉita de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu cetere konferencis post la UK en la loko Hanabanilla en la centro de Kubo.

Kursoj kaj ekzamenoj

Krom tio ankaŭ okazis internaciaj ekzamenoj de UEA, kiujn trapasis 6 kongresanoj. Aparte menciindas la okazigo de Ĉe-kursoj dum la UK. La kurson por komencantoj ĉeestis komence 23 kursanoj kaj 28 en la fino. Kiel kutime dum Ĉe-kursoj, la nombro da kursanoj kreskas dum la kurso mem. Ateston por A-grada seminario por Ĉe-instruistoj ricevis 12 partoprenintoj el kvin landoj. (Redaktista noto: Irena SZANSER (Pollando), kiu gvidis tiujn kursojn, tuj poste venis ĉe KCE-n en La Chaux-de-Fonds, kie ŝi instruis dum 3 semajnoj).

Pri la libroj

En la kultura programo nova iniciato estis la **Tago de la Libro**, kiu okazis la unuan fojon dum tiu ĉi UK. Prezentiĝis deko da eldonejoj kun fragmentoj el laste aperintaj verkoj. Apartan atenton ricevis du verkoj elstaraj pro sia kultura valoro kaj graveco: **La Danĝera Lingvo** de Ulrich LINS kaj **La Trezoro: Antologio de originala esperanta prozo.** (Noto: Ambaŭ libroj aĉeteblas en la libroservo de KCE).

Krom tio ankaŭ efektiviĝis priesperanta ekspozicio en la Nacia Biblioteko de Havano kaj akcepto de tri esperanto-verkistoj ĉe la Asocio de Kubaj Verkistoj fare de la vicprezidanto de tiu asocio. Lige kun tio menciindas la libroservo funkciinta dum la kongreso, kie eblis aĉeti librojn kontraŭ usonaj dolaroj kaj kubaj pesoj. Dum la tuta semajno ĝis la fermo de la kongreso la libroservo vendis librojn kaj aliajn varojn kontraŭ 17'200 usonaj dolaroj.

Pri la artaj aranĝoj

Kiel ĉiam dum la UK ankaŭ realiĝis bunta kaj varia arta programo. En la nacia vespero la gastiganta lando prezentis sin per temperamentoplenaj kubaj muziko kaj dancoj. Ankaŭ kelkaj eroj elstaris dum la internacia vespero, kiu cetere daŭris tro longe; Bulgara Esperanto-Teatro kaj jugoslaviaj geaktoroj, kiuj estas jam konataj el antaŭaj kongresoj, denove liveris valoran kontribuon al la esperantaj arto kaj kulturo.

Informado kaj ekskursoj

Dum la kongresa semajno ankaŭ okazis speciala seminario pri informado. En ĝi oni diskutis interalie pri la ellaboro de unueca enketilo por esplori kaj kompari la diferencojn kaj reagojn de eksteruloj al esperanto kaj por trovi taŭgajn argumentojn en la defendo de esperanto. Lige kun tiu temo estas menciinda la tre vasta kaj sukcesa ekstera informado. Multaj kubaj gazetoj, la radio kaj televidstacioj amplekse raportis pri la kongreso. Radio Havana, kie ekzistas esperanto-fako, intervjuis plurajn kongresanojn. Kaj dum la kongresa semajno mem, aperis 6 numeroj de la kongresa gazeto, kiu nomiĝis **La Havana Kuriero** kaj kiu estis redaktita de Bruĉjo KASINI (Italio), Orlando RAOLA GONZALEZ (Kubo) kaj Andy KÜNZLI.

Ankaŭ okazis trideko da ekskursoj al la plej diversaj partoj de la insulo, kun sume 1600 partoprenintoj.

UEA-kunsidoj

La Komitato de UEA povis plenrajte kunsidi dum la UK en Havano, kvankam oni iom timis antaŭ la UK, ke la komitato ne povos atingi la kvorumon. La plej signifaj decidoj dum tiu trisesia komitatkunveno estis eble la aliĝo de du novaj asocioj, nome de **Esperanto-Asocio de Estonio** kaj de **Ukraina Esperanto-Asocio**, tiel ke UEA-n ĉirkaŭas nuntempe 51 landaj asocioj. Krom tio oni akceptis unu plian fakan asocion, nome la jam menciitan **Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj.** Krom tio, la Komitato konfirmis kunlaboran kontakton kun du aliaj fakaj asocioj, nome **Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo** kaj **Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj.**

Grandioza bufedo

Fine mi devas substreki la fortan atenton, kiun atribuis al la Universala Kongreso la Kuba Registaro mem. En la inaŭguro neatendite aperis Fidel CASTRO mem, la prezidento de Kubo. Kaj multe pli elstara momento estis la akcepto de ducentkapa kongresa delegacio fare de la sama Fidel CASTRO en la Palaco de la Revolucio en Havano, kie li bonvenigis ĉiun partoprenanton persone kaj sprite parolis antaŭ la kongresanaro kaj regalis ilin per grandioza bufedo, kies manĝaĵoj

estis tiom abundaj, ke ili verŝajne estus sufiĉaj por nutri ĉiujn kongresanojn trifoje tage dum unu plena semajno.

Jen en koncizeco la gravaj okazintaĵoj dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano.

Akcepto de la svisa delegacio fare de la svisa ambasadoro

Surbaze de mia peto kiel ĝenerala sekretario de SES al la svisa ministerio pri eksterlandaj aferoj, la okkapa svisa delegacio, kiu partoprenis la UK-n, estis invitita ĉeesti akcepton fare de la ambasadoro de Svislando en Havano, s-ro Markus KEISER. Tiu vizito okazis vendrede, la 20-an de julio. Per du taksioj la ok kongresanoj - svisoj kaj nesvisoj loĝantaj en Svislando - veturis al la rezidentejo de la svisa ambasadoro, kiu troviĝas tuj apud la Konferenca Palaco (Palacio de las Convenciones), kie disvolviĝis ankaŭ la UK.

La ambasadora paro, gesinjoroj KEISER, tre afable bonvenigis nin, regalante nin per aperitivo, poste per riĉa kaj bongusta tagmanĝo kaj deserto. Dum tiu tempo okazis interesaj interparoloj: La ambasadoro klarigis al ni la vivon kaj la taskojn de la diplomatia reprezentanto de Svislando, kaj ni raportis pri la esperanto-kongresoj en Kubo kaj pri la celoj kaj la esenco de la Lingvo Internacia. La ambasadoro aŭdis tiujn klarigojn kun intereso. Samtempe estis transdonita al s-ro KEISER ampleksa dokumentaro pri esperanto.

Tri horojn daŭris la sukcesa renkontiĝo - sufiĉe longe kompare kun akceptoj en alilandaj ambasadejoj. Kontentaj pri tiu valora kontakto ni forlasis la belan rezidentejon kun ties plaĉa ĉirkaŭaĵo kaj piede repromenis al la kongresejo. Tiun akcepton partoprenis: gesinjoroj Bijan GHAZNAVI (Biel-Bienne), Charly KNUCHEL (Morges), Andy KÜNZLI (Kriens), Heidi LEUTHARD (Kriens), Carla MÜLLER (Luzern), Stanislaw POCHANKE (Wil), Dieter ROOKE (Oensingen) kaj Irene SÜESS (Luzern).

Kiel ĝenerala sekretario de SES mi dankis per letero al la svisa ministerio pri eksteraj aferoj pro la afabla aranĝo de tiu vizito.

-oOo-

DANKON PRO LA RICEVITAJ DONACOJ

Januare 1990: Fritz LIECHTI: SF 20.-; H. RENARD: 20.-; Marte: E. PANTKE: 50.-; P. SCHAUFELBERGER: 100.-; L. SCHAERER: 50.-; Maje: W. RIESER: 60.-; D. BÜHLMANN: 30.-; D. SCHAUBACHER: 20.-; P. RÜEGG: 100.-; H. SCHOCH: 30.-; H. RENARD: 30.-; L. DAHAN: 50.-; D. MÜHLEMANN: 1.-; T. CARLEVARO: 10.-; Junie: H. SCHMUTZ: 30.-; P. ELMER: 50.-; W. GIANNINI: 30.-; D. VAUCHER: 30.-; L. DOVAT: 10.-; M. BÉGUIN: 50.-; W. LAEDERACH: 30.-; G. MERZ: 30.-; J. FRIOT: 50.-; W. SCHAUFELBERGER: 35.-. Sume: SF 916.-

La kasisto Ernst VON MAY komunikas:

Inter la "donacintoj" estas kelkaj, kiuj opiniis pagi kun tio la kotizon por 1990. Sed ĉar ili pagis ĉi tiun kotizon jam antaŭe (do la duan fojon), mi permesis al mi registri tiun sumon kiel donacon.

La prezidanto Claude GACOND aldonas:

Ni dankas kaj aldonas novan ĝirilon en tiu ĉi koverto. Via malavareco ebligos al SES kreskigi sian poresperantan aktivecon. Ni ĉesos sendi la organojn de SES al la nekotizintoj por la jaro 1990 kaj dankas al ĉiuj, kiuj varbos novajn membrojn al SES. Jen ni memorigas la jarkotizojn: SF 50.-; infanoj kaj geknaboj ĝis 18 jaroj: SF 5.-; junuloj ĝis 26 jaroj kaj emeritoj: SF 30.-; geedzoj: SF 75-.-; geedzoj emeritaj: SF 45.- Nura abono sen membreco al SES: SF 30.-; donacabono (vi abonigas konatulon Svislande aŭ eksterlande: SF 20.- Ekde septembro novaj membroj por la jaro 1990 pagu la duonon de la indikitaj sumoj.

## SVISA KALENDARO

24-29 septembro, KCE - La Chaux-de-Fonds: ESPERANTO-STAĜO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ.

29-30 septembro, KCE - La Chaux-de-Fonds: STUDA SEMAJNFINO. Partoprenos ĝin karavano el Esperanto-Ligo en Baden-Württemberg (Germanio). Profitu tiun okazon por renkontiĝi kun germanaj samideanoj.

6-7 oktobro, Laŭzana Esperanto-Societo invitas vin por la **regiona semajnfino de** SES en Lausanne. Vidu la aldonitan informilon. Aliĝu kiel eble plej frue al tiu programriĉa aranĝo.

8-13 oktobro, KCE - La Chaux-de-Fonds: 4-a Kristana Kultur-Semajno Esperantista. Vidu la aldonitan informilon.

22-27 oktobro, KCE - La Chaux-de-Fonds: ESPERANTO-STAĜO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ.

26-28 oktobro, Landeg Akademie - Wienacht: Esperanto Semajnfino, Temo: Paŝoj al Tutmonda Socio, organizita de la bahaaj esperantistoj. Vi jam ricevis la koncernan informilon.

27-28 oktobro, KCE - La Chaux-de-Fonds: STUDA SEMAJNFINO.

19-24 novembro, KCE - La Chaux-de-Fonds: ESPERANTO-STAĜO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ.

24-25 novembro, Tiĉina Esperanto-Ligo invitas vin por **regiona semajnfino de SES** en Lokarno. Prelegos Tomasz CHMIELIK pri la temo: **Kiel formiĝis la interna ideo de esperantistoj.** Detalaj informiloj dissendotaj de d-ro Tazio CARLEVARO.

26 decembro - 3 januaro 1991, KCE - La Chaux-de-Fonds: VINTRO-FERIADO. Prelegtemo: Astronomio kaj astrologio. Petu la detalan informilon.

-oOo-